Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 27-an de aprilo 2023 per Zoom

Ĉeestis
Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
La tagordo aprobiĝis.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 16-an de marto 2023
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Esperantonia
Post la pasinta kunveno ni proponis al la Oslo-klubo altigon de iliaj kostoj al 20.000 kronoj.

4. Jarraporto 2022
Ni pretigis la jarraporton kaj baldaŭ publikigos ĝin al la membroj, prepare al la landa kunveno.

5. Niaj proponoj por la landa kunveno 2023
La estraro proponos al la landa kunveno simpligon de la kontoj en la librotenado.

Venis propono al la landa kunveno koncerne la eldonkvanton de Norvega Esperantisto. La estraro havas jenan sintenon al tiu demando:

«La landa kunveno diskutu la principan futuron de Norvega Esperantisto kaj evenualaj aliaj informkanaloj. La estraro atentigas, ke la estraro kaj la redaktoro jam decidis redukti al 4 numeroj jare, kaj ke ne ekzistas ekonomia urĝo, kiu necesigas redukton de la kostoj por membrogazeto.»

6. Laborplano
La estraro ne proponos al la landa kunveno enhavajn ŝanĝojn en la laborplano, sed proponos, ke la laborplanoj ekde nun validu ĉiam ĝis la sekva landa kunveno.

7. Tagordo por la landa kunveno
Ni pretigis la tagordon por la landa kunveno.

8. Porkomencanta kurso
Marianne informis pri la ĉi-printempa, digitala, porkomencanta kurso. Jam okazis ses (el ok) unuhoraj kursvesperoj. La kurso nun havas tri konstantajn partoprenantojn.

9. Eventualaĵoj
a) Informo: Marte Djupvik Håkmo verkis disertacion en la universitato de Agder, komparante la anglan kaj esperanton: «English vs. Esperanto: A comparative study of clausal word order in a Minimalist framework».

b) La estraro pripensos, kiumaniere ni provu kontakti la proksimume 30 membrojn, kiuj ne pagis sian kotizon por 2023.

10. Venonta estrara interkonsiliĝo
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 15-an de junio je la 20-a horo.

Protokolis Marianne Lund